

Joachim Ringelnatz,

## Valoras tamen

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Valoras tamen nian penon, ke  
ni plisimpliĝu je pretentoj niaj.  
Kaj estas ne grandanimeco, se  
toleras ni la kredon de aliaj.

Kaj se la diro veras, ke natur'  
pasio estas – bona aŭ malbona –  
enlaĉa nodo malligeblas nur <sup>3</sup>  
per amo kaj trankvil' memdona. <sup>4</sup>

*Traduko de la Germana poemo "Es lohnt sich doch" de JOACHIM RINGELNATZ (Hans Bötticher, \*1883 – †1934) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-07.*

*MR-189-3 / Arg-585-1179 (2012-05-14 21:31:12)*

---

<sup>3</sup>aŭ: solveblas nodo en ŝubendo nur

<sup>4</sup>aŭ: trankvile kaj per am' memdona.